

# NORDA ★ KURIERO

## *Nordfrancie aktivas kluboj kaj homoj*



Inica ateliero pri Esperanto laŭ iniciato de Eddy Goubinat en Dunkirko



Norda Francio estas pionira teritorio en Esperantujo: ja tie okazis la unua internacia kunveno en Kalezo en 1904 kaj evidente la unua Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bulonjo-ĉe-Marŝo en 1905. Sed, post longtempa svarmo de grupoj en la regiono, la nombro falis en la pasintaj 10 jaroj malgraŭ la tiam ĵus okazinta 100<sup>a</sup> UK en Lillo en 2015.

Tamen hodiaŭ plu kaj eĉ pli aktivas la nordfrancia movado! Krom la regiona federacio staras la du ĉefaj kluboj en Lillo kaj Araso. Ili organizas i.a. kursojn, informbudojn en foiroj asociaj aŭ similaj, prelegojn kaj akcepton de eksterlandaj esperantistoj.

Plie en Amieno la grupeto Espéranto 80 kunvenas regule por interŝanĝi, kaj ĵus laboris partnere kun la Domo de Jules Verne por esperantigi projekton (vd. p. 2). Ankaŭ homoj iam lernintaj Esperanton iniciatas por diskonigi la lingvon en siaj urboj. Tiel Eddy Goubinat starigis Esperantan rondon en Dunkirko kaj Facebook-grupon pri tiu rondo. Ankaŭ Jean-Marc Ben kreis sian Facebook-paĝon rilate al Kalezo (vd. p. 3). Jen bonaj iniciatoj subtenindaj de la regiona federacio!

# Claire Divoy, landa ĝenerala sekretario

 XAVIER DEWIDHEM

Claire Divoy estas 36-jaraĝa doktoro pri astrofiziko kaj instruas komputikon en la Lilla universitato. Ŝi eklernis Esperanton per somera inica staĝo de la Lilla klubo en 2019, kaj de tiam aktivas en la klubo.

En majo 2023 ŝi partoprenis la landan kongreson de Esperanto en Liono. Dum ŝi tie reprezentis la Nordfrancian Federacion, la landa komitato de Espéranto France (UFE) elektis ŝin estrarano okaze de la renovigo de la landa estraro! *“Mi jam estis volontulo dum la UK en Montrealo en 2022, kaj mi vere ŝatis helpi homojn per kaj por Esperanto, ŝi klarigas. Mi volis helpi ankaŭ en Francio. Tial mi decidis proponi min por la estraro.”*

Kaj la 17<sup>an</sup> de majo Claire fariĝis ĝenerala sekretario de UFE! *“Ni estas 8 en la estraro, kaj ĉiuj estas tre afablaj kaj helpemaj.”* Ŝi multe lernas pri la landa movado dank’ al la kontaktoj dum la kunsidoj, la



Claire en kunsido de UFE (supre dekstre, helblue)

helpo de la estraranoj, la retaj dosieroj dividitaj inter la aktivuloj kaj arkivigitaj. *“Mi ŝatus, ke pli da homoj donu tempon por Espéranto France, kaj ke la rilatoj inter membraj federacioj plifortiĝu.”*

Ni deziras al ŝi sukceson en sia landa ofico kaj en la reprezentado de la Nordfrancia Federacio, krom plua loka aktivado de ni ŝatata! ■

# La amiena vojo Aronnax en Esperanto



 LA GRUPO ESPÉRANTO 80

En Amieno la Domo de Jules Verne preparis la projekton *Aronnax*, kiu estas vizitvojo literatura, turisma, kultura kaj familia inter 18 lokoj dediĉitaj al la kreema genio kaj la fantazio de Jules Verne.

Ĉe ĉiu haltejo de la vizitvojo *Aronnax* staras klariga panelo verkita en la franca. Krome, ekde la fino de marto 2024, la vizitantoj tie povas legi en aliaj lingvoj, inkluzive en Esperanto, skanante QR-kodon!

S<sup>ro</sup> Desfeuillé de la Domo de Jules Verne ja kontaktis Jean-Claude Roy por esperantigo de la vizitvojaraj tekstoj. Jean-Claude invitis nin partopreni tiun aventuron, kiu vere ekzercis nian malgrandan grupon. Ni tradukis, kaj Jean-Claude sendis nian produktaĵon al la Domo de Jules Verne.

La vizitvojo *Aronnax* (2,6 km longa) efektiviĝis ĉi-printempe. Venu en Amienon, kaj ĝuu la viziton pri Jules Verne en Esperanto! ■

# Esperanto en lingva festivalo en Lillo

 **XAVIER DEWIDHEM**

En Lillo la firmao *LiL'Langues* celas lernigi la francan al plenkreskaj eksterlandanoj, kiuj studas, laboras aŭ portas projekton en la Lilla regiono. De sia fondo en 2015 ĝi akceptis 2 000 homojn el 80 diversaj landoj en la mondo ([lillangues.com](http://lillangues.com)).

Sabaton la 16<sup>an</sup> de marto 2024 ĝi unuafoje organizis lingvan festivalon el prelegoj, babiladoj kaj inicaj kursoj pri diversaj lingvoj... inkluzive pri Esperanto! Verdire ĉi tio estis surprizo por la Lilla Esperanto-klubo, kiu hazarde, lastmomente eksciis pri tiu aranĝo. Fakte tiun atelieron pri Esperanto proponis Olivier Sulmon, Esperanto-simpatianto, al la estraro, kiu ja aprobis — bonege!

El la klubo venis Michel Dechy kaj Xavier Dewidehem. Tiel ke Olivier lasis al Michel (kiun li nomis “*papo de Esperanto*”!) la taskon animi la kurseton: jen farate! Michel povis inici dum preskaŭ du horoj, per du sinsekvaj kursetoj, kiujn ĉeestis 10 homoj (gejunuloj, francoj kaj ĉefe fremduloj).



Michel Dechy inicas pri Esperanto en LiL'Langues

Ĉiuj interesiĝis pri la lingvo, laŭvoĉe ripetis ilustrajn vortojn, kaj pridemandis Michel en bonhumora etoso.

Fine la vicdirektoro Luke Jackson venis entuziasme, aĉetis esperantigitajn bildrakontojn, kaj respondis al Xavier, ke la sidejo de *LiL'Langues* ja povos akcepti kunvenojn aŭ atelierojn pri Esperanto laŭ bezono kaj peto de la klubo aŭ de la Federacio. Zorginda estas tiu ebla partnereco interlingva! ■

# En Kalezo mi revenas hejmen!



 **JEAN-MARC BEN**

Esperanto, verŝajne pro manko de tempo.

Kaj ĉi-jare mi renkontis la Fejsbukan paĝon de Eddy Goubinat (*Dunkerque Esperanto*), kiu instigis min reinteresiĝi pri Esperanto. Mi tuj poste aliĝis al *Esperanto France* kaj al UEA.

Imite al Eddy mi ankaŭ decidis krei mian propran Fejsbukan paĝon: *Esperanto Calais*. Kreinte ĉi tiun paĝon, mi esperas veki intereson pri Esperanto. Se funkcios, ni povos iri pluen, ekzemple gvidante kursojn.

Mi jam ĉeestis la atelieron de Eddy en tre amika kaj entuziasma etoso. Tio eĉ pli kuraĝigas min fari la samon baldaŭ. Esperanto estas ja eltrovenda lingvo senprokraste! ■

Mi estas emerita instruisto pri la angla kaj la nederlanda lingvoj. Mi eklernis Esperanton en la jaroj 1980<sup>aj</sup> kun la helpo de veterano esperantista, nome Julien Ducrocq el Kalezo, kiu de longe mortis. Li estis, por tiel diri, mia mentoro. Mi jam havis bonan nivelon tiutempe.

Sed iom post iom mi estis perdinta intereson pri

# Sesio en Lillo kaj vojaĝo en Torinon



Benedikto (centre) kun partoprenantoj



Komuna tagmanĝo de la partoprenantoj

En Lillo 12 lernantoj partoprenis Esperantan sesion en la t.n. 60<sup>a</sup> Domo inter la 21<sup>a</sup> kaj la 26<sup>a</sup> de julio 2023. La plimulto jam komencis lerni Esperanton per la kursoj organizataj de la 60<sup>a</sup> Domo dum la lernjaro kaj gvidataj de Katja Boen, Viktoro Simonnet kaj Benedikto Ente. Du lernantoj estis veraj komencantoj. Ĉiuj devenas de la ĉirkaŭaĵo de Lillo kaj ne loĝis en la Domo mem krom Aleksander Zdechlik, la instruisto kiu venis el Pollando. Po du kursoj okazis tage: la unua de la 10:00 ĝis la 12:00 kaj la dua de la 17:00 ĝis la 19:00. Kelkfoje la grupo estis dividita inter la progresantoj gvidataj de Aleksander kaj la komencantoj gvidataj de Viktoro. Ni eĉ sukcese spertis individuajn kursojn, dum kiuj la progresantoj instruas al la komencantoj.

Tagmeze la grupo manĝis kune en la Domo. Postagmeze okazis diversaj agrablaj proponoj, kiel promenado en parko, kantokurso aŭ vizito de la dominikana konvento. Post la dua kurso ĉiuj estis invitataj preĝi la vesperan preĝon duone Esperante kaj duone france en la preĝejo de la dominikanaj fratoj. Dimanĉe vespere, post la preĝo, okazis speciala programo: la grupo restis en la 60<sup>a</sup> Domo por vespermanĝi, kaj poste ĉiuj spektis per granda ekrano la filmon *Timbuktu* subtitolitan en Esperanto.

Ĉiuj partoprenantoj multe ŝatis la sesion, ĉefe la ĉeeston de Aleksander Zdechlik, kiu invitis nin en Pollando venontjare. La aranĝo estis ankaŭ bona okazo konigi Esperanton, kaj pluraj membroj de nia komunumo jam anoncis, ke ili intencas lerni Esperanton venontjare. La sesio estis organizita

## BENEDIKTO ENTE

por prepari la lernantojn partoprenontajn la Universalan Kongreson en Torino.

La 29<sup>an</sup> de julio 11 esperantistoj el Lillo veturis al Torino por partopreni la Universalan Kongreson. Ok el ili spertis sian unuan UK. Ni ĉiuj loĝis en apartamento proksima al la kongresejo kaj luita per AirBnB. Dimanĉe matene, la grupo ĝuis la solenan inaŭguron. Post kiam oni anoncis, ke la venonta UK okazos unuan fojon en Afriko, oni invitis ĉiujn afrikanojn ekstari. Verdire ili ne estis multaj. Veronika, membro de nia grupo kiu devenas el Kamerunio, fiere staris kaj estis forte aplaŭdata de la tuta asembleo.

Ĉiutage la lernantoj partoprenis meson en Esperanto kaj la kursojn gvidatajn de Katalin Kováts. Ili multe ŝatis la pedagoĝecon de la instruistino. La grupo ŝatis ankaŭ la koncertojn (ĉefe tiun de Kajto), la filmetojn, la teatraĵojn, la viziton de la muzeo kaj la belan urbon Torino. Merkrede matene ni ekskursis laŭ la paŝojn de Don Bosco; la aranĝon organizis IKUE. Merkrede vespere ni ricevis en nia apartamento Bruno kaj Maryvonne Robineau, kiuj rakontis sian sepjaran rondiradon ĉirkaŭ la mondo. Dum la semajno ni ofte kaj spontane kantis *Spiru en Ni Sankta Spirit'*, kiu fariĝis kvazaŭ nia propra himno.

Tiu vojaĝo konsciigas la lernantojn pri la realeco kaj la viveco de Esperanto. Ĉiuj revenis hejmen kun la deziro daŭrigi diligente la lernadon de la lingvo. ■

# El la junulaj vojaĝoj estiĝas la saĝo



Kiam mi estis juna plenkreskulo dum la jaroj 1980<sup>aj</sup>, mi ŝatis vojaĝi dum la someraj ferioj en sud-eŭropajn landojn, nome Italio, Hispanio, Grekio k.a.

Mi ĵus komencis mian profesion vivon, kaj ne havis multan monon; do mi vojaĝis nur kun mia dorsosako kaj bonaj marŝo-ŝuoj. Mi kutimis kaŝi mian monon kaj miajn vojaĝoĉekojn en mia kalsoneto. Laŭdire la mono ne odoras, sed miaflanke ne estis tute vere (pardonu al mi ĉi tiun facilan serĉon)!

Tiuepoke estis ekzalte vojaĝi kvazaŭ vagulo. Mi ĉefe veturis per vagonaro, per la fervoja karto *Interrail*, kiu ebligis vojaĝi malmultekoste tra Eŭropo dum unu monato, kondiĉe ke oni ne uzu la francajn trajnojn. Mi uzis ankaŭ busojn kaj kelkfoje petveturadon. Sed mi ofte piediris multajn kilometrojn.

Por ŝpari monon, mi kutimis tranokti ĉu en trajno dum la veturado, ĉu en stacidomoj atendante du konektajn trajnojn, ĉu en urbaj parkoj. De tempo al tempo mi gastis en malmultekostaj hoteloj por duŝi min kaj purigi min. Mi renkontis tie plurajn gejunulojn kiel mi, el multaj diversaj landoj (ĉefe germanoj, usonanoj, nederlandanoj), kiuj vojaĝis sammaniere.

La someron de la jaro 1982 mi decidis ferii en Grekio. Estis longa veturado tra Belgio, Germanio, Aŭstrio, Jugoslavio kaj finfine Grekio.

Mi alvenis tiam la trajnostacion de Ateno, kaj devis

 **PATRICK DUBOIS**

atendi alian vagonaron, kiu startos morgaŭe por Sparto (antikva greka urbo). La nokto komenciĝis, kaj mi decidis tranokti en malhela sed kvieta placeto malantaŭ la stacidomo. Mi kuŝiĝis sur la herbaro inter du florbedoj apud mia dorsosako. Mi estis laca kaj ekdormis rapide. Subite, en la nokto, mi ekaŭdis bruetojn tre proksime al mi. Mi tuj vekigis kaj ekvidis en la mallumo grekan junulon, kiu diskrete provis malfermi la poŝojn de mia sako.

Mi tuj ekstaris kaj demandis al li angle: “*What do you do? What do you want?*” (kion vi faras? kion vi volas?). La junulo ŝajnis terurita kaj respondis balbute: “*Mi... mi... volas fajron... por mia cigaredo.*” Sed li ne havis cigaredon en la buŝo! Mi komprenis, ke li volis ŝteli miajn aferojn el mia dorsosako. Mi respondis firme, ke mi ne havas fajron; kaj la junulo malaperis rapide en la varma sparta nokto. Post tio mi ne plu povis dormi, kaj mi restis vigla ĝis la sunleviĝo.

Kompreneble, tiufoje mi estis bonŝanca. Sed en aliaj feriaj vojaĝoj oni ŝtelis al mi diversajn aferojn: fotiloj, kasedmagnetofono, kaj tiel plu... Nuntempe, kiam mi ferias, mi vojaĝas aŭte, mi loĝas en hotelo, mi manĝas en restoracio, kaj mi enlitiĝas frue. Estas pli sekure. Kiel diras la saĝulo: el la junulaj vojaĝoj estiĝas la saĝo! ■

# Familiaj pripensoj



Ĉar mi estis tre ŝokita, pri kio okazis kaj okazas en Israelo kaj Palestino, miaj unuaj filozofiaj demandoj estas: de kie mi venas? kaj kien mi iras? Al la dua demando, facile mi kapablas respondi: mi iras kaj vivos ĝis mia morto.

Sed al la unua demando necesas pli da vortoj por respondi... de kie mi venas? Mia juda familio trapasis multajn eventojn, aventurojn, mirindaĵojn, kaj ankaŭ terurajn malfeliĉojn.

Pasintjare mia frato komencis interesiĝi pri genealogio, faris arbojn, kaj verkis tekstojn pri la vivo de niaj gepraavoj. Poste li kunvenigis siajn gefilojn kaj genepojn kaj li legis al ili la enhavon:

“Karaj infanoj kaj nepoj,

“Vi foje prave demandas vin: ‘De kie mi venas? Ĉu mi estas izolita estaĵo sur ĉi tiu tero?’ La respondo estas: ne, ĉar ĉiu el ni havas, krom sia propra personeco kaj siaj propraj spertoj, kulturaĵojn kaj historion, de la gepatroj, geavoj kaj prapatroj.

“Gravas koni ĉi tiun historion, ĉar ni ne povas vivi nur en la materia ĉiutaga vivo; ni devas integri kaj imagi niajn proprajn radikojn por scii, kiuj ni estas.

“Tamen, en nia familio, vi bonŝancas troviĝi ĉe la kunfluo de pluraj jud-kristanaj nacioj, popoloj kaj kulturoj, de kiuj vi estas denaske la heredantoj: Francio, Hispanio, Germanio, Rumanio, Ukrainio.

“Por helpi al vi koni tiun ĉi heredaĵon, krom la genealogiaj arboj, mi verkis ĉi tiun tekston, kunlabore kun mia fratino Joëlle, en kiu ni rakontas al vi la

 JOËLLE MULLER

*originojn de diversaj branĉoj de nia familio, la aventurojn – ofte sed ne ĉiam tragikajn – de ilia historio, la vivojn de kelkaj viaj antaŭuloj; kaj mi rakontas ankaŭ pri mia propra infanaĝo.*

*“Mi komencas maljuniĝi, kaj anstataŭ vagadi mi preferas konigi al vi mian propran historion kaj miajn emociojn.*

*“Tun tagon eble vi faros same kun viaj propraj posteuloj, tiel daŭrigante ĉi tiun necesan kaj mirindan ĉenon inter generacioj...”*

## La patrina familio

Pri nia patrina avo mia frato Ariel rakontas.

Mia patrinflanka avo Ozias Jeoŝua Hartanu naskiĝis en 1893 en la urbo Ubuŝi en norda Rumanio.

Li edziĝis kun Ruĥla Sachter, kies familia nomo signifas “rita buĉisto” en la jida; ĝi devenas de la profesio de la praavo. Ĉar la buŝistoj havis la privilegion ne militservi, la familio ŝanĝis sian nomon “Rapaport” (tre ofta nomo en Rumanio) al Sachter.

La avino estis kuraĝa kaj tre afabla virino. Ŝi multe suferis pro dorsaj problemoj dum sia tuta vivo, kaj multe laboris por prizorgi siajn kvar infanojn, kun ofte malfacilaj vivkondiĉoj, precipe dum la milito.

La paro loĝis en la urbo Roman en Rumania Moldavio, kie mia patrino Roza naskiĝis en 1923. Tie tiutempe vivis granda juda komunumo, ●●●

## **Familiaj pripensoj** (daŭrigo)

●●● ĉ. 40 % de la popolo. Kaj Ozias estis mergita ekde sia infanaĝo en tre religian etoson, kaj dediĉis multe da tempo al talmudaj studoj.

La ĉefa lingvo en lia ĉiutaga vivo estis la jida, pli ol la rumana, kaj li havis bonegan scion pri la antikva hebrea. La familio havis prosperan vendejon, ili vendis iom de ĉio, ili ne estis malfeliĉaj.

Sed en la jaroj 1920<sup>aj</sup> kreskis antisemitismo, pli forta ĉe rumanoj ol ĉe rusoj, kiuj tiam protektis judojn. En 1926 la familio elmigris al Francio kun la tri infanoj: Kalman 7-jara, Annette 5-jara, Roza 3-jara. La pli juna, Léon (Lulu), naskiĝis en Parizo en 1932. En 1939 la familio akiris francan ŝtatanecon.

Post la milito vivkondiĉoj estis malfacilaj, kaj, por nutri sian familion el kvar infanoj, Ozias starigis metiejon por produkti butontruojn.

La avo estis pedelo de la sinagogo t.n. *Oratoire de Montmartre* ĉe la strato Doudeauville, en malriĉa kvartalo de la 18<sup>a</sup> distrikto de Parizo, kaj la familio loĝis ĉe la strato Myrha en modesta konstruaĵo.

Sabate, religiaj judoj rajtas nek labori, nek laborigi, nek manipuli monon, nek skribi, eĉ ne ŝalti lumon aŭ hejtilon. Tamen necesas ŝalti lumojn por la diservo en la sinagogo kaj por kalkuli la promesojn de donacoj, kiujn la fideluloj vokitaj por legi eltiraĵojn de la Torao devis deklari laŭte ĉi-okaze.

Mia avo trovis solvon. Por la lumo, estis la balaisto, nejudo oficisto de la sinagogo, kiu memstare, supozeble sendevige ŝaltis kaj malŝaltis lumojn kaj hejtadon ĝustatempe.

Por la donacoj, mia avo antaŭpreparis kovertojn kun nomoj de la donacantoj, serion da paperoj kun diversaj eblaj mondonacoj kaj alian serion kun la eblaj destinoj. Do kiam oni vokis la personon kaj demandis lin, kiom li donos, se li respondas ekzemple: “50 frankojn por la templo”, mia avo glitis la paperojn “50 frankoj” kaj “templo” en lian koverton. Do dum la sekvantaj tagoj li povis peti la anoncitajn donacojn.

Li estis tre bona administranto, perfekte estris la kontojn de la religia asocio, kaj estis gratulita de la fiska inspektoro .

Ozias estis kuraĝa, amema kaj malavara viro, li tre

amis infanojn kaj ĉiam havis bombonojn en la poŝo por disdoni al infanoj, kiujn li renkontis surstrate.

Li estis la familia patriarko. Dum la judaj festoj Hanuka (la festo de lumoj, en vintro) kaj Pasko, la tuta familio kunvenis ĉe la domo de miaj geavoj por tradicia vespermanĝo de tipaj pladoj, kaj ĉiuj antaŭaj kaj postaj benoj kaj preĝoj.

La avo estis senkompromisa pri la observado de ritoj kaj reguloj de judismo, sed ne tre klariga: li ne tradukis preĝojn, ĉiuj en la malnova hebrea, do estis sufiĉe tede aŭskulti... Fine de la paska vespermanĝo oni kantis la epizodon pri la paska ŝafido: “*Mia patro aĉetis ŝafideton en la bazaro*” en la aramea “*Had Gadya*”, kaj Avo ĉiam aldonis en la jida “*A kleines Ziegele*” (kapreto). Mi ne komprenis la vorton *Ziegele*; mi kredis, ke temas pri cikadoj, kaj diris al miaj gepatroj: “*Jen, li finfine rakontos pri la cikadeto.*”

La nereligieco kaj ateismo de mia patro (bofilo de la avo) iom afekciis lin. Tamen pri tio li neniam koleris... Li preferis ŝerci en la jida lingvo, kaj diris ŝerce imitante benon: “*Benata estas vi, Eterna Dio Nia; Jules, vi ne estas bona judo!*”

En la sinagogo estis ankaŭ alia grava rolulo: la *kantisto*, nome iu s<sup>ro</sup> Pinkas, kiu kantis la preĝojn. Lia altsona titolo en la franca estis *oficianta ministro*. Li vere pensis, ke li estas ministro. Mi opinias, ke li estis ĵaluza pri mia avo.

Fakte, mia avo estis tre malfeliĉa pro sia plej aĝa filo Kalman, kiu dum edziĝa periodo havis katolikan amantinon kaj filinon nomita Christine (kristana antaŭnomo). Tio estas tre malaprobata en la juda religio, kaj damaĝis lian bonegan reputacion. Mi suspektas, ke Pinkas profitis ĉi tiun situacion por kalumnii mian avon kaj anstataŭi lin. Kvankam la avo dungis lin, kiam Pinkas estis malriĉulo kaj malfeliĉulo.

Por eskapi de ĉi tiuj kalumnioj, mia avo decidis elmigri al Israelo, kiam li estis jam maljuna. Miaj geavoj ekloĝis en Zikron Jakov, proksime al la kibuco *Maian cvi*, kie vivis ilia filino Annette. Ili finis sian vivon en bonaj kondiĉoj ĉirkaŭataj de kelkaj el siaj gefiloj kaj genepoj, kaj ili mortis — li 85- kaj ŝi 80-jaraĝaj. ■

# Serĉado de taŭga veturilo

 **DIDIER TOULLER**

De pluraj jaroj mi serĉas simplan manieron veturi, komplemente al aŭto. Evidente, paŝi estas plej facile sed postulas pli da tempo.

*Biciklo* pli taŭgas por vojaĝi pli rapide dum kelkaj dekoj da kilometroj. Se ni elhejmiĝas, neniu problemo (kondiĉe ke estu sufiĉe da spaco por parki ĝin). Sed se necesas uzi aŭton aŭ publikan transporton, povas iĝi problemo. Tamen ekzistas faldeblaj bicikloj, kelkaj vere kompaktaj, kiel Brompton-bicikloj.

Je pli malgranda skalo ekzistas *skutilo*. Facile stokebla, ĝi ebligas facile vojaĝi kelkajn kilometrojn, sed ne sen ekzerci la kruojn! Tamen mi ne nepre volas sporti kaj ŝviti ĉiufoje, kiam mi eliras: elektra motoro estus bonvena.

La *motorskutilo* estas populara ĉe multaj homoj. Sen speciala trejnado, ĝi ebligas moviĝi facile. Pli granda kaj peza ol tradiciaj skutiloj, ĝi okupas iom da spaco hejme aŭ en kofrujo de aŭto, kvankam ne kompareble al biciklo. Sed ĝi ne estas sen malavantaĝoj: la radoj estas malgrandaj, kaj la distanco inter la grundo kaj la fundo de la tabulo estas malgranda. Tio postulas grandan viglan atenton koncerne la vojon kaj la obstaklojn. Krome la stiriloj estas mallarĝaj, kio reduktas manovreblon, kiam la rapideco pliiĝas.

Antaŭ kelkaj jaroj, dum promenado en Ĵuraso, mi provis *starveturilon Segway*. Veturi estas simple: klinante la korpopezon antaŭen, oni movas la veturilon antaŭen, kaj, movante la pezocentron malantaŭen, oni malrapidigas kaj haltigas ĝin. Stabila veturilo, intuicia veturado, perfekta... sed iom peza kaj spacokupa.

La ideala transportrimedo estu kompakta, malpeza, manovrebla kaj kapabla vojaĝi sur diversaj terenoj. De kelkaj jaroj ĝi ekzistas: la *elektra unuciklo*.

Elektra unuciklo (ofte mallongigita *EUC*) estas memekvilibriga propra transportilo kun nur unu rado. La rajdanto regas la rapidecon per klinado antaŭen aŭ reen kaj stiras per klinado kaj tordado de la



Elektra unuciklo (EUC)

aparato ambaŭflanke. La memekvilibriga mekanismo uzas giroskopojn kaj akcelomezurilojn.

La elektronikaj moduloj en la unuciklo ebligas la bonordan stabiligon de la rajdanto. Ili estas dizajnitaj tiamaniere por detekti eblan malĝustan kliniĝon kaj restarigi ekvilibron moviĝante antaŭen aŭ malantaŭen.

La ĉefa veturanta elemento de la unuciklo estas elektra motoro, kies potenco influas la maksimuman rapidecon de movado de la veturilo. La unuciklo aldone enkorpiĝas radrandon, sur kiu norma ●●●



## *Sercado de taŭga veturilo* (daŭrigo)

●●● bicikla pneŭo estas muntita: radoj je 14" (coloj) ĝis 18" estas inter tiuj, kiuj estas plej ofte uzataj en la kazo de tiaj veturiloj. Kompreneble ekzistas ankaŭ unucikloj kun pli malgrandaj aŭ pli grandaj radoj. Ĉio dependas de la elektita veturilo-modelo.

La unuciklo ne havas tradiciajn bremsilojn uzatajn en la kazo de plurradaj veturiloj. Tamen malrapidigi estas facile kaj intuicie. Bremsado baziĝas sur movo de la korpopezo malantaŭen (kio estas la malo de akcelo).

Ĉar rajdi EUC estas male al rajdado de io ajn alia, lerni rajdi estos kaj defia kaj tre amuza. Komence ĝi ankaŭ estos sufiĉe fizike postulema (vi malkovros plurajn nekonatajn muskolojn en viaj kruroj kaj piedoj). Poste, kiam vi akiras la lertecon, viaj veturoj similos al mildaj promenoj. La lernokurbo ŝajnas simila al lerni kiel veturi per tradicia biciklo. Ĝi ne estas, kvazaŭ vi saltus sur ĝin kaj irus. Por plej multaj homoj necesas unu aŭ du horoj por sperti "flugadon" unuafoje. Post kiam vi povas fari rektan linion, temas pri konstruado de sperto metante kiel eble plej multajn kilometrojn sur ĝin. Helpas ankaŭ iom da pacienco. En kelkaj kazoj helpo de sperta rajdanto aŭ trejnisto estas valorega. Estas multaj instruaj videoj ĉe Jutubo.

Kiel infano mi neniam spertis *rulsketilon* aŭ *rultabulon*. Antaŭ proksimume dek kvin jaroj mi provis *vicradajn glitilojn*, sed sen sukceso. Mi ankaŭ ne skias. Fakte mi bezonis kelkajn monatojn por trovi mian ekvilibron sur la unuciklo. Sed ekde tiam la progreso estis rapida, kaj la sinsekvaj veturoj fariĝis glataj kaj tute intuiciaj.

Dum lernado kaj rajdado ĉiam memoru: portu protektan ilaron.

Uzi elektran unuciklon postulas, ke vi de tempo al tempo levu ĝin, kaj foje eĉ portu ĝin en ŝtuparon. Ju pli granda la rado, des pli peza ĝi fariĝas. Do konsideru, kiom da levado vi devos fari en viaj ĉiutagaj vojaĝoj. 14-colaj EUC-oj kutime pezas ĉirkaŭ 16 kg, 18-colaj EUC-oj ĝis 26 kg, 16-colaj EUC-oj sidas ie en la mezo. Ekzistas ankaŭ unuciklojn super 40 kg...

En 2023 pendsistemajn modelojn enkondukis kvar ĉefaj fabrikistoj: ĉefe Kingsong kaj Inmotion, sed ankaŭ Begode (antaŭe Gotway) kaj Veteran.

Nepre endas rekomendi koni la regulojn pri veturado de unuciklo, ĉar ili estas malsamaj en ĉiu lando. Oni devas ĉiam observi trafikajn regulojn fiksitajn de aŭtoritatoj en sia lando. Tio ebligas sekure uzi la unuciklon, kaj garantios ankaŭ la sekurecon de aliaj vojudantoj. Kontrolu la maksimuman rapidecon de unuciklo en difinita lando. Ankaŭ indas kontroli, kiajn vojojn oni povas uzi dum vojaĝado per unuciklo.

*En Francio :*

Ekde la dekreto de la 23<sup>a</sup> de oktobro 2019, modifita la 31<sup>an</sup> de aŭgusto 2023, la novaj motorizitaj personaj movaparatoj (*engins de déplacement personnel motorisés* – EDPM) leĝe ekzistas. Ili estas motor-skutiloj, elektraj unucikloj, starveturiloj, mem-ekvilibriĝaj rultabuloj...

La reguloj estas esence la samaj kiel tiuj aplikeblaj al bicikloj, kun kelkaj specifecoj. Ĝeneralaj reguloj:

- Veturi estas malpermesite por iu ajn malpli ol 14-jaraĝa;
- Estas malpermesite esti kun pluraj homoj sur la maŝino: uzo estas ekskluzive persona;
- Estas malpermesite porti aŭdilojn aŭ ajnan aparaton, kiu povus elsendi sonon, aŭ uzi la telefonon tenitan en via mano;
- Asekuro estas deviga, ĉar ĝi estas konsiderata termotora veturilo laŭ la asekura kodo;
- Estas malpermesite veturi sur la trotuaro. Alie la veturilo devas esti tenita mane;
- En urbaj areoj estas devige veturi sur biciklovojoj kaj vojoj, kie ili ekzistas. Se ne ekzistas tiujn biciklovojojn, ĝi povas vojaĝi sur vojoj kun maksimuma rajtigita rapideco de 50 km/h aŭ malpli;
- Ekster urbaj areoj ĝia cirkulado estas rajtigita nur sur verdaj vojoj kaj biciklovojoj;
- Maksimuma rapideco devas esti limigita al 25 km/h. ■

# Ĉu elektra unuciklo estas taŭga solvo?

 KATJA BOEN

Prave kaj iom gurde kuracistoj kaj amaskomunikiloj konsilas al ni pli ofte ekzerciĝi, surbaze de statistikoj pri plibonigo de sanstato. Aliflanke homoj ofte bezonas moviĝi por labori, aĉetumi... Do, kial ne uzi taŭgan ekzercilon kiel transportilon?

Laŭ la artikolo de Didier Touller (vd. p. X), jam ekzistas multegaj novaj entuziasmigaj eblecoj moviĝi! Sed... ĉu varbi por plia elektra veturilo estas vere bona ideo en nia mondo, kiu suferas kaj suferegos pro klimatoŝanĝiĝo?

Elektra veturilo estas perfekta, kiam dank' al ĝi homo sukcesas ne uzi individuan aŭton. Kiam vi intencas transporti plurajn infanojn, kiam vi loĝas en montara regiono, kiam vi havas problemojn pri sano aŭ aĝo, ktp., tiam elektrohelo estas tute adekvata solvo. Alikaze, ĉu ne estas pli bone uzi t.n. homenergian transportilon (france: *véhicule à propulsion humaine*), ekz. tute simplan biciklon, anstataŭ uzi motoran personan transportilon (*engin de déplacement personnel motorisé*)?

Elektra unuciklo ŝajnas al mi tute neutila eltrovaĵo, ĉar ĝi ne povas utili al tiuj homoj, kiuj nepre bezonas elektrohelson por moviĝi. Kiam oni vidas bildojn de homoj rajdantaj sur unucikloj, ĉiam ili rajdas unuope, sen transporti ion ajn... kaj ĉefe ili estas junaj kaj sanaj! Didier Touller mem skribas pri la neceso alkiutiĝi al unuciklo. Kaj ĉu la pezo de tiu veturilo ebligas facile porti ĝin en trajnon, aŭtobuson...? Certe ne, ĉar la malplej peza (16 kg) estas pli peza ol faldebla biciklo (inter 10 kaj 13 kg). Plie, kelkaj faldeblaj bicikloj havas malgrandajn kromradetojn por rapide puŝi la falditan biciklon kvazaŭ ĉareton.

Antaŭ multaj jaroj, rezigninte pri aŭtoveturado, mi aĉetis faldeblan biciklon, kaj ĝi ebligis ĉion al mi: esti sendependa, vojaĝi sen peti, ke iu veturigu min al kaj de stacidomo... Kun ĝi kaj per ĝi mi iris al



Hispanio, Germanio ktp. Kun mia edzo ni eĉ vojaĝis en montara regiono kun ĉio utila al plurtaga tendumado! Kiam la vojo fariĝis tro kruta, ni tutsimple puŝis la biciklojn.

Didier Touller timas “*sporti kaj ŝviti ĉiufoje*” biciklante. Miaopinie, ne tie kuŝas la problemo. La vera problemo estas kultura. Mi ja pensas ekzemple pri nederlandanoj, kiu ĉiutage kaj elegante biciklas al siaj laborejoj: ili neniom maltrankviliĝas pri ŝvitado! Cetere, ankaŭ en Francio kaj aliloke en Eŭropo ni konstatas rimarkindan progreson pri la biciklo en nia ĉiutaga vivo kaj en niaj ĉiutagaj veturoj. Finfine ŝajnas, ke la plej simpla, la plej malnova, la plej taŭga solvo por ĉiutage veturi estas la (faldebla) biciklo! ■

“SUPLEMENTO POR KOMENCANTOJ” DE RICHARD VALET POR NORDA GAZETO (2000-2015)

# Ŝercoj de mia patro



Ludoviko estis bona kaj fidela amiko de mia patro. Kune ili multe biciklis kaj vizitadis la dancejojn antaŭ la milito. Ŝajnas al mi, ke ili faris ŝercojn<sup>1</sup>, inter kiuj tri revenas en mian memoron.

Iu kombisto kutimis razi la virojn sabaton posttagmeze. Dum li komencas ŝmiri<sup>2</sup> la vizaĝon de kliento per ŝaŭmo<sup>3</sup> sapo helpe de peniko<sup>4</sup>, la du amikoj eksplodigas petardon en la koridoro de la kombistsalono. Pro surprizo, tiu-ĉi eksaltas kaj puŝas la penikon en la nazon de la kliento. La afero kaŭzis grandan emocion, sed oni ne vere identigis<sup>5</sup> la kulpulojn, kvankam ekzistis fortaj suspektoj<sup>6</sup>...

Alifojte, nokte, post ĝoja vespero kaj trinkado, kun aliaj kamaradoj, ili translokis<sup>7</sup> la budon, kie oni kuiris frititajn terpomojn. La fritisto emociiĝis antaŭ ol retrovi sian budon en najbara strato.

En dancejo, okazis iam prezentado de junulinoj okaze de la elekto de *Miss France*. Super la dancareno<sup>8</sup> estis paŝponteto<sup>9</sup>, sur kiu defilis unuope la kandidatinoj. Ludoviko kaj mia patro metas reverse sian jakon, suprenfaldas<sup>10</sup> sian pantalonon kaj paŝas sur la ponteton. Ili gajnas viglajn aplaŭdojn, sed, ambaŭflanke de la ekstremo de la ponteto, atendas ilin du fortuloj, kiuj pli-malpli afable kondukas ilin al la direktoro, al kiu ili promesas esti trankvilaj ekde nun.

Poste, pro veto<sup>11</sup>, mia patro provas inviti *Miss France* por danci dum la balo. Ŝi afable rifuzas, klarigante, ke ŝi ne rajtas, pro la klaŭzoj<sup>12</sup> de sia kontrakto, sed ke ŝi bedaŭras, ĉar danci kun li multe plaĉintus<sup>13</sup> al ŝi... Mia patro perdis sian veton kaj devis pagi la aperitivan al siaj kamaradoj, sed tamen tre fieris. ■

## VORTPROVIZO

- |  |   |
|--|---|
| 1. ŝerco = <i>plaisanterie</i> .                     | 8. dancareno = <i>piste de danse</i> .                            |
| 2. ŝmiri = <i>enduire, recouvrir de</i> .            | 9. paŝponteto = <i>passerelle</i> .                               |
| 3. ŝaŭmo = <i>mousse, écume</i> .                    | 10. suprenfaldi = <i>retrousser</i> (faldi = <i>plier</i> ).      |
| 4. peniko = <i>pinceau</i> (ici : <i>blaireau</i> ). | 11. veto = <i>pari</i> .  |
| 5. identigi = <i>identifier</i> .                    | 12. klaŭzo = <i>une clause</i> .                                  |
| 6. suspekto = <i>soupçon</i> .                       | 13. tio plaĉintus = <i>tio estus plaĉinta = cela aurait plu</i> . |
| 7. transloki = <i>changer de place</i> .             |   |

# Ni jarkunvenu en Lillo la 14<sup>an</sup> de aprilo

Sekve al nuligo de la regiona Zamenhof-festo planita en decembro 2023, la Nordfrancia Federacio kun la Lilla klubo finfine organizos sian jarkunvenon dum **dimanĉo la 14<sup>a</sup> de aprilo 2024** en la junulargastejo de Lillo (235 boulevard Paul Painlevé; metrostacio *Porte de Valenciennes*).

La programo komenciĝos per akceptado de la partoprenantojn ekde la **10:30** kun kafo, trinkaĵoj kaj kuketoj. Ekde la 11:00 okazos la federacia membrokunveno: tiam raportos kaj interŝanĝos la reprezentantoj de la Federacio, de la kluboj kaj de diversaj lokaj iniciatoj.

Je la 13:00 la ĉeestantoj manĝos surloke, antaŭ distra programo proponota de la Lilla klubo: detaloj baldaŭ anonciĝos per niaj retejo kaj sociaj retoj.



La fasado de la Lilla junulargastejo

Bonvolu informiĝi kaj anonci vian partoprenon per la federacia retejo: **nordafrancio.fr!**

## Membriĝu al Esperantujo!


Jen estas la tempo (re)membriĝi al niaj Esperanto-asocioj: la lokaj kluboj (Amiena, Arasa kaj Lilla), la regiona Federacio kaj la landa asocio *Espéranto France*. Sufiĉas klopodi kaj kotizi nur unufoje por ĉiuj asocioj!

Por tio vi sendu vian membriĝilon kaj pagu vian interasocian kotizon al la landa asocio *Espéranto France*, aŭ papere/poŝte, aŭ rete:

[www.esperanto-france.org/adherer](http://www.esperanto-france.org/adherer)

Poste *Espéranto France* rilatos kun la Federacio kaj la kluboj por komuniki la liston de la membroj kaj ĝiri la respektivajn kotizopartojn.

Sciu pli pri la kotizoj: [www.nordafrancio.fr/associations/adherer](http://www.nordafrancio.fr/associations/adherer)



## KOLOFONO

La **Norda Kuriero** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas trifoje en jaro: marte, julie kaj novembro.

Ĉefredaktas: **Katja Boen** kaj **Xavier Dewidehem**.  
Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn, anoncojn, raportojn, artikolojn kaj fotojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso:

**kuriero@nordafrancio.fr**

ĝis la unua dimanĉo de marto, julio kaj novembro.

La fotoj kaj bildoj en ĉi tiu numero devenas de: (p. 1) Jean-Marc Ben, D-Maps; (p. 2) Aleks Kadar, Amiens Métropole; (p. 3) Xavier Dewidehem, SPL Grand Calais Tourisme et Culture, Jean-Marc Ben; (p. 4) Benoît Ente; (p. 5) Freepik/jcomp; (p. 6) Joëlle Muller; (p. 8) Andrew T.; (p. 10) Freepik; (p. 11) Freepik/wayhomestudio; (p. 12) HI Lille, *Espéranto France*.